# DIA REGNO

✪ dumonata kristana revuo en esperanto ✪ n-ro 2 (851) ✪ 2005

DIA REGNO

ISSN 0167-9554



En la komenco estis la Vorto [Logos] kaj
la Vorto estis kun Dio kaj la Vorto estis Dio

## KELI

**Kristana Esperantista Ligo Internacia fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*



**Prezidanto**: Philippe COUSSON
🖂 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
✆ +33 (0) 549468021;
💻 keli@chez.com

**Sekretario**: Els VAN DIJK-KUPERUS
🖂 Koningsmantel 4,
NL 2403 HZ Alphen a/d Rijn, Nederlando;
✆ +31 1724 20222;
💻 e.a.vandijk@hetnet.nl

**Kasisto**: Siegfried KRÜGER
🖂 Dinkelsbühler Str. 12,
DE 74074 Heilbronn, Germanio;
✆ +49 7131 162688;
💻 SLKrueger@gmx.de



**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- ✪ Membro-subtenanto €30,- ✪ Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- ✪ pagante al Libroservo €18,- ✪ Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. ✪ Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI ✪ Nederlanda poŝtĝirkonto de KELI: 5506132.

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon **www.chez.com/keli/**

---------------

## DIA REGNO

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908 dumonata revuo - ISSN 0167-9554**



**Redaktoro**: Bengt Olof ÅRADSSON
🖂 Heimdalsvägen 24,
S 149 32 Nynäshamn, Svedio;
✆ +46 (8) 52016816;
💻 dr_boarad@yahoo.se



Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).



***Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.***



**Ekspedado:** Pavel Polnický, Na Vinici 110/10
🖂 CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio;
✆ +420 325 615 651;
💻 Cea.polnicky@quick.cz

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
💻 info@astroprint.cz


## ENHAVO


| | |
|---|---|
| Papo Johano Paŭlo la 2a | 27 |
| 4-a ADORU-Seminario | 29 |
| Merkredo | 30 |
| Momentoj de la vivo de M. Luther | 37 |
| Mi estas kiu estas — Parto 2 | 38 |
| Frumatene | 40 |
| Mia patro | 40 |
| Kongresloko kaj novaj aliĝintoj | 41 |
| Semi fidele per preĝado | 42 |
| Interretaj kaj komputilaj vortoj | 44 |
| Kiu estas tiu -Philippe Cousson | 45 |
| Informetoj | 46 |
| Neniam forgesitaj | 47 |
| Kiel mi scius | 48 |


## REDAKTORAJ VORTOJ

La ĵus pasinta tempo pleniĝis per la novaĵo ke la papo mortis. La papo estis grava persono por multaj homoj, organizoj kaj nacioj, eĉ por la esperantomovado. Mallongan historion pri la papo vi povas legi en la jena numero de Dia Regno. Tiuj kiuj havas interreton kaj interesiĝas pri tio, kio nun okazas, povas serĉi informon sur la oficiala ttt-paĝo de IKUE.

Per la ilustraĵo sur la kovra paĝo mi volas iel komprenigi ke ofte ni per niaj multaj ĉiutagaj vortoj kelkfoje riskas kaŝi la plej gravan vorton - Logos - Jesuo Kristo. Legante kaj kompilante la kontribuojn en tiu ĉi numero, mi havas la esperon ke vi trovos kaj sentos la 'odoron' de Kristo tra ĉiuj vortoj skribitaj.

Finfine mi volas danki pro ĉiuj esperigaj vortoj kaj esprimoj, eĉ laŭdoj, kiujn mi ricevis en mia nova 'ofico' kiel redaktoro.

# Papo Johano Paŭlo la 2a (1978-2005)

eltiraĵoj de: http://www.ikue.org/index.html

**Deklaro la 2an de aprilo - horo 21.50**
La Sankta Patro mortis ĉi-vespere je la horo 21.37 en sia privata loĝejo.

Per la forpaso de Johano Paŭlo la 2a la Eklezio perdis unu el la plej longaĝaj paŝtistoj de sia dumiljara historio. Tiu de Papo Wojtyla estis la tria plej longdaŝra papeco de la historio, post tiu de Sankta Petro kaj de Beata Pio la 9a: ĝi daŭris 26 jarojn, 5 monatojn, 17 tagojn. Ĝi komenciĝis la 16an de oktobro 1978, kaj ĝi profunde markis la iradon de la historiaj kaj ekleziaj eventoj.

Karol Jozef Wojtyla, la viro kiu fariĝis, kun la nomo Johano Paŭlo la 2a, la 264a posteulo de Petro kaj la unua neitala Papo ekde la morto - en 1523 - de la nederlanda Adriano la 6a de Utrecht, naskiĝis en la pola urbo Wadowice, la 18an de majo 1920, tria filo de suboficiro de la armeo kaj de dommastrino.

En 1941 la morto de lia patro, jam malsana ekde kelkaj jaroj, aldoniĝas al la serio de funebroj, kiuj, dum la antaŭaj jaroj forprenis al li la patrinon kaj la fratojn, kaj la evento lasas la 21-jaraĝan Karolon sola en la mondo, ĝuste en la momento kiam la dua mondmilito transformas Pollandon en unu el la landoj kiel la krueleco de la naziista perforto elmontras sin per plej multe da perforto. La juna Karol estas devigata de la cirkonstancoj alterni la universitatan okupon kun pezaj laboroj en minejo kaj fabriko. Dum tiu malmola momento laŭgrade maturiĝas lia pastra vokiĝo..

En 1946 li pastriĝas en Krakovo kaj en tiu urbo, post plia periodo de pliprofundiĝo en Romo, li doktoriĝos pri Teologio. En Pollando kiu estis tiam subpremata de la marksisma ateismo, komenciĝas por la juna pola pastro la jaroj de lia paŝtista servado, unue kiel paroĥestro en vilaĝo, kaj poste kiel instruisto ĉe la fakultato pri teologio de la Universitato de Lublino. En 1958, nomumita episkopo de Pio la 12a, li fariĝas, apenaŭ 38-jaraĝa, la plej juna pola episkopo.

La morto de Paŭlo la 6a, en aŭgusto, kaj tiu posta kaj neatendita de Papo Luciani, iom pli ol unu monaton poste, devigas la kardinalaron denove alfronti la temon de la pontifika posteulado. Tiu blanka estas la kvara fumado de la dua konklavo de 1978.



Je la horo 19.22 de la 16a de oktobro Karol Wojtyla, post alpreno de la nomo Johano Paŭlo la 2a, aperas je la loĝio de la Baziliko

de sankta Petro por saluti Italion kaj la kristanan mondon. Ĝi estas la unua el la multaj unuaĵoj: neniam antaŭe Papo dum la unua apero alparolis la fidelulojn:

*"Mi ne scias ĉu mi povas bone esprimiĝi en via... en nia itala lingvo. Se mi eraros, vi korektos min. Kaj tial, mi prezentas min al vi ĉiuj... por komenci denove laŭ ĉi tiu vojo de la historio kaj de la Eklezio, kun la helpo de Dio kaj kun la helpo de la homoj".*

### Johano Paŭlo la 2a kaj Esperanto

Ĉiuj scias, ke Esperanto estas aprecata en Pollando, en kies katolika medio ĝi estas uzata de jardekoj. En tiaj cirkonstancoj ne estas mirige, ke la tiama Metropolito de Krakovo, kardinalo Wojtyla, sekvis kun simpatio la katolikan E-movadon. Tio kulminis en 1977, per la akcepto de la Alta Protektado de la 37a IKUE-kongreso, al kiu li sendis jenan mesaĝon (legeblan en la libro de tiu Kongreso): *"Patro Sankta, gardu en via nomo tiujn, kiujn Vi donis al mi, por ke ili estu unu tiel same, kiel ni. (Joh. 17,11). Kiel Jesuo Kristo preĝis por siaj disĉiploj pri la unueco, tiel same mi en la nomo de la Eklezio preĝas viaintence. Unu kredo kaj unu amo helpu al vi unuigi la disbatitan mondon en unu ŝafaron sub unu Paŝtisto. Unu supernacia lingvo - Esperanto - ankaŭ servu efike al ĉi tiu nobla celo. En mia propra nomo kaj en la nomo de multaj favoraj al vi polaj episkopoj, mi benas vian agadon kaj deziras al vi la Dian gracon".*

Alian esprimon de simpatio kardinalo Wojtyla faris malmultajn monatojn antaŭ la elekto al papeco, kiam li bondeziris al EK okaze de la 75-jara datreveno de nia revuo (v. EK 8/1978, p. 132).

Dum la papeco de Johano Paŭlo la 2a la katolika E-movado travivis multajn gravajn momentojn de sia historio: agnosko de IKUE kiel asocio laŭ papa juro, aprobo de la Meslibro kaj Legaĵaro, enigo de Esperanto inter la lingvoj uzataj de la Papo Kristnaske kaj Paske.

Kun Johano Paŭlo la 2a Esperanto fariĝis ne nur lingvo "aprobata", sed ankaŭ "parolata" de la katolika Eklezio.

Ekde Pasko 1994 la Papo aldonas Esperanton al la plurlingvaj bondeziroj "Urbi et orbi" (al Romo kaj al la mondo). Ekde tiam je Pasko li diras: *"Feliĉan Paskon en Kristo resurektinta";* je Kristnasko: *"Dibenitan Kristnaskon kaj prosperan novjaron".*

En 1997 la IKUE-kongreso okazas dum la komencaj 3 tagoj en Romo, kaj la kongresanoj partoprenas en la ĝenerala aŭdienco en placo Sankta Petro de la 3a de septembro. Al ili la Papo adresis sin en esperanto per la vortoj: *"Mi ĝojas bonvenigi la responsulojn de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista engaĝitajn en sia kvindeka Kongreso. Karegaj, la temo de via renkonto reprenas la misian taskon konfiditan de Kristo al sia Eklezio. Akceptu ĝin malavare kun tiu spirito de universaleco, kiu estas ĉe la bazo de la lingvo kiun vi kulturas".*



# 4-a ADORU-Seminario

22-an ĝis 25-a de februaro 2005, Strasburgo

Siegfried KRÜGER, DE

Gvidita de la pastroj Bernhard Eichkorn kaj Albrecht Kronenberger okazis ADORU-seminario en Strasburgo en februaro. Partoprenis 30 gekristanoj el 5 nacioj. Memore al pastoro Adolf Burkhardt, kiu forpasis en 2004, okazis rekviemo kaj prelego de la filino Regina Lorösch.

En la broŝureto (titolpaĝo sube) Regina sur 20 paĝoj memorigas la vivon de la patro. El la komenco mi citas enkondukajn vortojn kaj la ĉapitrojn:

*Mi [Regina] volonte memoras la momentojn, en kiuj mia patro kantis por ni. Kiam mi estis ankoraŭ malgranda, unu el siaj favoritoj estis la infankanto 'Vivojn sep mi volus havi', kiun li poste ankaŭ tradukis en Esperanton kaj kiu troveblas en ADORU numero 630. Mi pensas, ke tiu ideo pri la sep vivoj lin mem fascinis, ĉar liaj inklinoj kaj interesoj certe suficus por sep vivoj. Tiu ĉi kanto donis al mi la ideon, ĉi tiun prelegon dividi en sep diversajn intereso-fokusojn de Adolf:*

1. *Meti-amatoro kaj elprov-emulo*
2. *Aktoro kaj literatur-emulo*
3. *Bibliotekisto*
4. *Muzik-emulo kaj kolektanto de kantoj*
5. *Parohestro kaj instruisto*
6. *Filologo kaj interpretisto*
7. *Esperantisto*



Grete Burkhardt & Regina Lorösch



Regina Lorösch
en kunlaboro kun
Grete Burkhardt

EL LA VIVO
DE MIA PATRO
ADOLF BURKHARDT

Prelego en Strasburgo la 25an de februaro 2005
El la germana tradukis Albrecht Kronenberger

Villingen-Schwenningen 21.2.2005



Grete Burkhardt kaj memorbildoj

# Merkredo

1a duono

Gerrit Berveling

Je la sepa kaj duono mi vekiĝis. La infanoj jam gaje bruis sube. Mi tien iris, salutis, manĝis. Ili iris al la lernejo tuj antaŭ la oka. Tiam mi telefonis mian edzinon por nia ĉiutaga babilo. Ŝi jam duonan horon estis laboranta. Poste mi faris kelkajn telefon–alvokojn: por fiksi vizitojn en la venonta semajno, por nuligi interkonsenton ne plu plenumeblan ĉar intervenis la vendreda enterigo, por informiĝi pri ies farto – post hieraŭa operacio de la partnero –, ktp. Du homoj min telefonis pri diversaj aferoj. Poste mi preparis kafon, iom ordigante samtempe la aĵojn en la kuirejo. Infanoj ja ofte lasas kuŝi post si tiom da aferoj. Se tiel mezuri, mi povus esti bona infano…

La matenon mi uzas grandparte por prepari prelegon pri Origeno. Venontan semajnon ni havos unu el niaj tiel nomataj „Komunumaj Vesperoj". Tio estas larĝe anoncataj kunvenoj en la preĝejo, vespere je la oka ĝis la deka kaj duono. Dum tiaj vesperoj iu enkondukas prelege pri difinita temo. Kutime la temoj de la sezono estas interligitaj inter si. La enkondukojn faras diversaj gepastoroj, tion oni fiksas plurajn monatojn anticipe, kompreneeble.

La temo de la nuna ciklo estas: *Teologoj en ilia propra tempo*. En la ciklo mi prizorgas du prelegojn: unu pri Origeno, ĉar li estas la unua pli malpli scienca teologo kiu ekzistas en la kristana eklezio, – kaj post kelkaj monatoj, en marto mi kredas, mi parolos pri Roessingh, Nederlanda teologo liberala. Li estis Remonstranto, kaj vivis kaj verkis ĉirkaŭ la jarcent–ŝanĝiĝo ĝis en la tridekaj jaroj de la 20a jarcento. Por tiaj "Komunumaj Vesperoj" oni ne nur invitas la anojn de la propra loka komunumo eklezia, sed ankaŭ eksterulojn, eĉ pere de la tiel nomata Kablogazeto de la loka televida reto. Ofte ni tamen estas nur 'inter ni', sed je certaj temoj tamen oni rimarkas ke reagas eksteruloj…

Mezume ni estas kvardek–kvindekope en tiaj vesperoj. Ne malbona rezulto. Mi legas kaj faras notojn. Por prelego mi *devas* fari notojn. Mi tion fari tute ne emas. Malamas eĉ. Dumstudade mi tute ne kutimis fari notojn. Ofte mi nur legis la studolibrojn, kuŝante en mia bano, kaj ju pli komplika estis la ekzameno al kiu mi min preparis, des pli longe mi kuŝis enbane tiutempe…

Sed nun, por prelegoj, mi kutimiĝas fari notojn. Mi ŝatas iom noti belajn kaj trafajn citaĵojn tute laŭlitere, por ke al la ĉeestantoj mi donu kiom eble plej fidindan bildon pri la traktata periodo aŭ persono. La homoj tion ŝatas, mi rimarkis. Kompreneble mian prelegon mi ne eltajpas komplete tiel kiel mi planas eldiri ĝin. Mi tajpas, bone konsciante, ke dumprelege multloke mi

ja adaptos la vortigon, depende de la reagoj de la publiko, aŭ de hazardaj ekideoj, kiujn mi havos. Tion mi faras same ĉe predikoj. Se predikon iu ŝatus posedi tia, kia mi ĝin eldiris, tiam nur surbendigo povos helpi. Ĉar eĉ se hazarde la kompleton mi eltajpis anticipe, eĉ tiukaze kutime mi ne eldiras ĝin tia.

Origeno estas fascina persono. Jam dum mia universitata periodo mi legis (parte) liajn librojn *Kontraŭ Kelso*, kaj plurajn el liaj predikoj. Ankaŭ li neniam elskribis siajn tekstojn. Sed stenografoj notis liajn predikojn, por eldono libroforma. Li disponis ja pri pluraj stenografoj – ankaŭ por noti la librojn, kiujn li verkis por prikomentado scienca al la Biblio. Riĉa lerninto lia disponigis tiujn al li. Imagu: pastoro kun stenografoj ĉirkaŭ si, kia lukso estus! Kaj tion jam disponis Origeno – en la 2a jc!

Nun mi legas lian *Pri la Principoj*. – Tio estas la unua sistema teologio de Kristanismo. La tuton de la religio li provis sumigi en ĝi.

Mi legas:

*Ĉar multaj el tiuj, kiuj sin nomas kristanoj, malkonsentas, ne nur pri etaj kaj treege malgrandaj aferoj, sed eĉ pri grandaj kaj treege grandaj aferoj, nome pri Dio, pri la Sinjoro Jesuo Kristo, pri la Sankta Spirito, kaj ne nur pri tio sed ankaŭ pri la kreitaĵoj, nome pri la "regadoj kaj potencoj": tial ŝajnas al mi necese, unue fiksi klaran linion kaj nemiskompreneblan gvidŝnuron en tiuj ĉi demandoj kaj nur post tio plu demandadi pri la ceteraj aferoj.*

> Mi ŝatas iom noti belajn kaj trafajn citaĵojn tute laŭlitere, por ke al la ĉeestantoj mi donu kiom eble plej fidindan bildon pri la traktata periodo aŭ persono.

Kaj iom pli poste:

*La diversaj punktoj, kiujn la predikado de la apostoloj transdonis klare, estas la jenaj: ke estas Unu Dio, kiu ĉion kreis kaj ordigis – la Dio de la justuloj, de Adam, Abel, Set, Henoĥ, Noa, Sem, Abraham, Isaak, Jakob kaj la 12 patriarkoj, Moseo kaj la profetoj, kaj ke tiu ĉi Dio "en la lastaj tagoj", kiel anticipe Li estis parolinta pere de la profetoj, sendis la Sinjoron Jesuo Kristo, por voki unuavice Izraelon kaj poste ankaŭ la paganojn, kiam lia popolo Izrael montriĝis ne fidela al Li. Tiu ĉi justa kaj bona Dio, la Patro de nia Sinjoro Jesuo Kristo, donis mem la Leĝon, la Profetojn kaj la Evangelion, kaj samtempe estas Li la Dio de la apostoloj: la Dio de Olda kaj Nova Testamentoj kune. Due, ke Jesuo Kristo, la sama kiu venis, naskiĝis el la Patro antaŭ la tuta kreitaĵaro. Post kiam ĉe la kreado Li servis sian Patron (ĉar ja 'pere de Li ĉio fariĝis, kio*

fariĝis' – diras Johano), en la lastaj tagoj Li humiligis sin kaj fariĝis homo, akceptis la karnon kaj homiĝis, kvankam estante Dio, kaj tamen post sia homiĝo Li restis, kio Li estis: Dio. Li havis tute similan korpon kiel ni, nur kun la diferenco, ke Li naskiĝis el virgulino kaj el la Sankta Spirito. Tiu ĉi Jesuo Kristo vere suferis kaj ne nur

„Aŭ, ĉu Li estas Filo de Dio aŭ ne. Tion laŭ sia kapablo ĉiu devas mem pristudi el la Skriboj.

laŭŝajne kaj Li vere submetiĝis al la morto, kiu estas komuna al ĉiuj homoj. Li same vere restariĝis el inter la mortintoj; post sia resurekto li interparoladis kun siaj lernintoj kaj finfine leviĝis enĉielen. Krome ili transdonis al ni la mesaĝon pri la Sankta Spirito, kiel partoprenanto en la honoro kaj gloro de la Patro kaj de la Filo. Sed ĉe Li oni ne plu klare distingas, ĉu Li estas naskita aŭ nenaskita. Aŭ, ĉu Li estas Filo de Dio aŭ ne. Tion laŭ sia kapablo ĉiu devas mem pristudi el la Skriboj. En la eklezio, tamen, estas klare instruate, ke tiu ĉi Sankta Spirito inspiris ĉiujn sanktajn profetojn kaj apostolojn, kaj ke en la prauloj ne estis alia Spirito ol tiu kiu estis en la homoj, kiuj inspiriĝis ĉe la alveno de Kristo. Krome ankaŭ, ke la animo havas propran substancon kaj vivon, kaj ke estos repagite al ĝi laŭ ĝiaj meritoj, okaze de ĝia foriro el ĉi tiu mondo. Ĝi ja povas ricevi la heredaĵon de la eterna vivo kaj fariĝi feliĉa, se ĝiaj faroj tion meritis, aŭ ĝi subfalas en la eterne punantan fajron, se kulpopezo ĝin devigas al tio. Sed ankaŭ, ke estos tempo de reviviĝo de la mortintoj, kiam tiu ĉi korpo, kiu semiĝas en pereemo, restariĝos en nepereemo, kaj kiam kio estis semita en senhonoro, leviĝos en gloro. Ankaŭ certas en la eklezia instruado, ke ĉiu animo estas provizita per libera volo kaj elektado, ke ĝi devas batali kontraŭ la diablo kaj ties anĝeloj, kaj kontraŭ la malamikaj fortoj, ĉar tiuj ja strebas al tio, ŝarĝi ĝin per pekoj, sed ni strebas al tio, almenaŭ kiom ni vivas ĝuste kaj prudente, ke ni liberigu nin el tio. La sole ĝusta konkludo el tio ĉi estas, ke sekve ni ne estas submetitaj al iaspeca Fato, tiel ke seneskape – ja eĉ kontraŭvole – ni do estus devigitaj fari bonon aŭ malbonon. Se ni ja estas mastroj pri niaj decidoj, tiam ja eblos ke certaj potencoj forlogos nin al pekado, kaj aliaj ja povos esti utilaj al ni por subteni nin je saviĝo – sed per tio ni do ne necesege estas devigataj, agi ĝuste aŭ malĝuste. Tion ĉi lastan kredas nome tiuj homoj, kiuj pensas, ke la irado de la steloj estas la kaŭzo de la agoj de la homoj, – ne nur de tiuj agoj, kiuj kuŝas ekster la homa libera volo, sed eĉ koncerne tiujn agojn, kiuj ja dependas de ni. Koncerne la demandon, ĉu la animo estas transdonata de generacio al generacio kune kun la spermo, tiel ke ĝia esenco aŭ substanco do estus limigita je la materia semo, aŭ ĉu, male, ĝi havas alian originon, kaj ĉu tia origino estus

*eterna aŭ neeterna, aŭ minimume la demando ĉu la animo enkondukiĝas en la korpon deekstere aŭ ĉu ne, – pri tio la eklezia instruo ne decidas kun sufiĉa klareco. Ankaŭ pri la diablo, pri ties anĝeloj kaj la malamikaj potencoj la eklezia instruo ja instruas ke ili ekzistas, sed kiaj ekzakte ili estas kaj kielaj, tion ĝi ne klare dismetas. Ĉe la plimulto ekzistas la opinio, ke la diablo estas estinta anĝelo, kiu fariĝis ribela kaj konvinkis certan kvanton da anĝeloj kune ekribeli – tio do estas 'liaj anĝeloj'. Krom tio la eklezia instruado ampleksas ankaŭ la dogmon, ke tiu ĉi mondo estas kreita kaj ke ĝi havis komencon je certa momento, kaj ke pro sia fieco ĝi ankaŭ devos foje perei. Sed kio estis antaŭ tiu ĉi mondo, kaj kio estos post ĝi, tio al la amaso ne estas klare sciata. En la eklezia instruado pri tio estas neniu klareco. Krome, ke la Skribon verkis la Spirito de Dio, kaj ke ĝi ne nur havas la signifon kiu unuavide klaras, sed ankaŭ pli kaŝitan signifon. Ĉar kio estas skribita, tio estas eksteraj figuroj de certaj sekretoj kaj bildigoj de Diaj aferoj. En tio la tuta eklezio kredas, ke la Leĝo estas spirita, sed ke la spirita flanko de la Leĝo ne estas konata al ĉiu, sed nur al tiuj, kiuj dank' al la graco de la Sankta Spirito ricevis la saĝon kaj la komprenon.*

Kaj poste mi legis plu. Origeno, komence de sia ĉefverko, do klopodas por resumi tion, kion li konsideras komuna al ĉiuj kristanoj. Li notas iom pretere, kio estas ne jam tute klare difinita. Kaj kio estas libere pristudinda. Pluraj el la aferoj, kiujn li nomas, ankaŭ nuntempe ankoraŭ grave rolas en pluraj kristanaj eklezioj. Tamen, pri kelkaj temoj la plimulto supozeble tre ekmiros. Precipe pri liaj demandoj koncerne la animon. Tiu ĉi mondo ne estas eterna, sed kreita. La baza celo estas evoluo al nova mondo de senmateriaj spiritoj. La Fonto de ĉio estas Dio, la senfina, senlima, la bona, kiu sin konigas en la Filo kaj en la spiritoj, kiujn Li kreas. La Filo ne estas parto de la Patro, sed ja devenas de Li, kiel brilo el lumo. La *Logoso* estas eterna – de antaŭ ĉiu kreo. Por Origeno la *Logoso*, tamen, ĉiam restas submetita al la Patro. Nur Dio Patro estas nenaskita/nekreita – Dio Mem. La Filon Origeno nomas *Dua Dio*. Preĝante, Origeno do volas ke oni sin turnas nur

Sed kio estis antaŭ tiu ĉi mondo, kaj kio estos post ĝi, tio al la amaso ne estas klare sciata. En la eklezia instruado pri tio estas neniu klareco.

al Dio Patro. Ne al la Filo. – Por liberalaj kristanoj tio estas memkompreneblaĵo, ĉu ne? – La plej alta ento, kiun kreis la Filo, estas la Sankta Spirito. (Pere de Li fariĝis ĉio, kio fariĝis – Joh.1:3…) – kune ili formas la Sanktan Triunuon por la adoro de ni homoj. Apud kaj sub la Sankta Spirito staras senlima nombro da aliaj raciaj naturoj, kiujn kreis la Filo; tiuj partoprenas en Dio pere de la *Logoso*. En la *Dua Libro* Origeno daŭrigas pri

tio: ĉiujn raciajn naturojn Dio kreis egalaj – kun libera volo, kun la eblo evolui malsame. Sekvis la pekofalo de la intelekta mondo: falintaj spiritoj kaj racioj. Por ke Li ie lasu tiujn falintajn entojn, Dio tiam kreis la materian mondon: ĉielo, tero kaj infero estas intencitaj por loki la falintajn spiritojn enmaterie. Kelkaj malpli pekis, aliaj pekis pli serioze. La malplej pekintaj, malplej punitaj, estas tiuj kiuj fariĝis la anĝeloj kaj la steloj (kiujn li konsideris vivaj); la plej falintaj estas la demonoj; kaj meze inter ili – la homoj. Ankaŭ la homaj animoj estas tiaj falintaj spiritoj; ĉiu animo do, ĉe la naskiĝo de la homo, envenas en ĉi mondon ŝarĝita per kulpo – el antaŭ sia falo. Do ĉiu homo bezonas saviĝon. – Kiu en la *Tria Libro* estas montrata – en la agado de la Dia *Logoso*, la Filo, kiu fariĝas homo en Jesuo Kristo. La

> Por ke Li ie lasu tiujn falintajn entojn, Dio tiam kreis la materian mondon: ĉielo, tero kaj infero estas intencitaj por loki la falintajn spiritojn enmaterie.

morto de Jesuo por Origeno estas la 'elpago' al la diablo, por liberigi la animojn el ilia kulpeco. Sed la definitiva saviĝo nur realiĝos postmorte. Kaj tie ĉi Origeno rompas kun la tradicio. Li ja ne negas la returniĝon de Kristo ĉe la mondofino, nek la Lastan Juĝon kaj la resurekton, – ili estis jam tradiciaj donitaĵoj liaepoke – sed ĉe li ili ne rolas serioze en lia fido je Dio. Por Origeno la infero estas kvazaŭ lavejo kie puriĝas la animoj pekintaj. Sed finfine ĉiu saviĝos, eĉ la diablo. ———

Telefono min interrompis. Ne estis io grava, sed tamen. Afable mi respondis la petitajn informojn:
— Jes, bone, sinjoro. Kompreneble.
— Mi komprenas, vi pravas…
— Ĉu? – Do, …
— Se mi nun povas resumi: vi do…
— Ho jes ja, sinjor' ———

Finiĝis la interparolo. Lasta saluto. Alkroĉitas.

Mia cerbo nun ne plu emas al Origeno. Nu, post kelkaj tagoj denove estos tempo iom plui. Ankoraŭ estas tempo por fini la prelegon. Sed la plano ja estas nun klara, kaj bone taŭga: unue iom pri lia vivo, pri liaj problemoj kun la episkopo de Aleksandrio, pri lia teologia laboro, poste lia elmigro al Palestino, la tiea aktivado, ree problemoj kun la hierarkio, – fine la morto. Poste la kvereloj kontraŭ-origenaj; kelkaj lin defendas tamen. Sekvas parta kondamno, kaj fine, kiam jam kelkajn jarcentojn li estas mortinta, oni definitive lin kondamnas kiel herezulon… Ĉar li ne agnoskis la dogmon de la Triunuo, – kiu liatempe eĉ ne ekzistis jam… kaj ĉar li kredis je la amo de Dio eĉ tiugrade, ke por li infero senfina estis nepensebla. Eĉ la ĉefdiablo mem, liakrede, finfine sin reamikigos al Dio, interpaciĝos, tiel ke finfine, en la eterneco, la infero ja eble

ekzistos, sed estos eterne malplena… ĉar ĉiuj kiuj vivis, estos unu kun Dio…”Dio ĉio en ĉiuj” kompleta repaciĝo reciproka… jen Origeno…pia, plena je fido je Dio, sciencema laŭ tiutempaj kriterioj, ne laŭ la niaj, la unua reprezentanto de iaspeca historia–kritika pristudo pri la Biblio, la unua kiu provis kritike starigi la plej aŭtenten, la plej fidindan tekston de la Sankta Skribo, Origeno, la martiro, la junulo emocia kiu pretis iĝi martiro sed kies patrino tion sciis preventi kaŝante liajn vestaĵojn, la pruda junulo kiu ne kuraĝis nuda iri surstraten por iĝi martiro… strange multflanka homo, strange unuflanka samtempe, ĉiam okupita tage kaj nokte nur pri Dio kaj ties Paroloj… serĉante en ili ĉiajn sencojn kaj signifojn, eĉ tie kie neniu plu trovis sencon, eĉ tie kie ĉiu abomenplene forturniĝis de la teksto… Ekzemple: Lot kiu sekskuniĝis kun siaj propraj filinoj, – historio tiel abomena ke pro ĝi – kaj similspecaj – pluraj homoj simple rifuzis konsideri kristanismon serioze… sed Origeno klopodas pruvi, ke ĉiu teksto povas havi tri diversajn signifo–tavolojn: krude– korpan, spiritan kaj mensan… kaj foje la krude–korpa signifo, kiel ĉi tie ĉe la rakonto pri Lot, estas tiel kruda, ke ne ĝin povas celi Dio, sed ke nur la sube kaŝiĝanta spirita senco estas intencita de Dio… 'Kompatinda Origeno, kiu klopodas savi la nesavindan, miatakse… Origeno, la pia, la homo de la eklezio, kiun akrege kondamnis ĝuste la eklezio… Por li ne estis afero de dubo, ĉu homoj naskiĝas nur unufoje aŭ pliajn fojojn: por li estis nepra la konfido, ke finfine ĉiu homo atingos beatecon en Dio – kaj sekve, se homo vivis ne ĝuste laŭ la volo de Dio, do tiukaze la koncernato post certa tempo estos resendita kun nova korpo al la tero, kvazaŭ knabo mezlerneja kiu

...jen Origeno…pia, plena je fido je Dio, sciencema laŭ tiutempaj kriterioj, ne laŭ la niaj, la unua reprezentanto de iaspeca historia–kritika pristudo pri la Biblio...

ne bone elfaris sian taskon, estas resendita hejmen, refari la taskon… tion li nomis: transenkorpiĝo… Kaj fakte, ankaŭ en la Biblio, kvankam malofte, por tia pensmaniero li povis trovi vorton…

En la libro *Saĝeco* (unu el la duakanonaĵoj) staras en 8:19–20: *Mi estis infano bone dotita kaj ricevis de la sorto bonan animon, aŭ, pli bone, estante bona, mi eniris en nemakulitan korpon… Do tie oni povas legi, se dezirate, ke la homo estas animo, kiu povas transmigri en novan korpon…*

Nur tiamaniere, ĉu ne, Origeno? eblas klarigi, kial Dion oni prave povas nomi justa, se samtempe ni vidas, ke ofte infanoj mortas eĉ kiel beboj: kian ŝancon por meriti eternan feliĉon, povas esti havintaj tiaj beboj? Ja nenian, ĉu? Do, laŭ–origene: ili retransenkorpiĝas kaj havos novan eblon… Same pri monstroj kiel Napoleono, Hitlero… Finfine repaciĝo tute ĝenerala – NE simple amnestio, sed: repaciĝo… Kaj kompreneble estos

senchave, citi la fragmenton kie li sumigas la laŭ li tradicie akceptatan priskribon pri la fido kristana. Estas ege interese, konstati, kiom tiu priskribo, el tiel fora tempo, rekoneblas, se oni pensas pri la pli ortodoksaj kunkristanoj ĉirkaŭe… Tio supozeble ja vekos iom da pria diskutado…

Estas bone. Prelego en “Komunuma Vespero” ja devas esti ne nur prelego – unuflankaĵo. Devas estiĝi interparolo. Mi manĝis iom da pano, trinkis lakton. Varman ĉifoje. Kun anizo. Poste mi iris butikumi. Legomojn, ovojn, trinkaĵojn, panon ktp. Kiam mi revenis, jam estis la poŝto. Nenio vere grave urĝa. Sed tamen: estas pli bone, tuj respondi ol forŝovi. De forŝovo ofte iĝas neplupovo… Mi respondis la kelkajn leterojn.

Posttagmeze mi trafis sinjorinon, ne en oldulejo; ŝi loĝis ankoraŭ memstare; sed ho kiel soleca. Ni iom parolis. Mi povis por eta momento enrigardi abismon da sufero: Japana militkaptiteco en Indonezio (“nia Hindio”), infanoj kaj edzo perditaj, ree edziniĝis, viro kun kvar jam grandaj infanoj, neniam akceptita kiel nova patrino, ĉiam nur stifa, malgraŭ tuta sia am–dediĉo, longa malsano de la edzo – tie sur lito li kuŝis antaŭfenestre – dum pli ol dek jaroj – ftizo – kaj la infanoj, kiuj adoltiĝis, foriris, nuptis kaj malaperis – ŝi eĉ adresojn ne havis. “Dio estas amo” – “repaciĝo” – amaraj sonas foje tiaj esprimoj… Oni renkontas pli da homoj kun sufero ol sen. Foje mi min demandas, ĉu vivi vere ne estas unuavice amare… kontraste al la Latina diraĵo *vivere est amare*: vivi estas ami.

... do mi povos elekti ion, pri kio dum la lastaj du semajnoj mi plurfoje aŭdis paroli homojn en nia komunumo, temon, pri kiu mi povas supozi, ke se kelkaj ĝin tuŝas, supozeble ĝi tuŝos ankaŭ aliajn… Sed kion?

Posttagmeze, inter kelkaj mallongaj renkontiĝoj kaj interbabiloj ie tie, mi jam estas daŭre pensanta pri la diservo de la sekva dimanĉo: pri kio mi predikos? Nia eklezio ja ne konas fiksitajn skemojn, ke je certa dato oni legu certan eron aŭ erojn el la Biblio. Nur okaze de Kristnasko kaj Pasko, Granda Vendredo kaj Pentekosto oni estas iom limigita en la elekto de la temo – kvankam eĉ je tiuj datoj oni ne estas devigitaj legi ekzakte preskribitajn partojn el la Biblio – sed en normalaj dimanĉaj diservoj oni povas legi kiun ajn parton, pri kiu ajn temo, – unuflanke tre facile, ĉu ne? sed aliflanke ĝuste pro la senlimeco estas kelkfoje komplike elekti… Kion mi elektu? Ofte sin trudas al mi tiom da temoj traktotaj, traktendaj en prediko… Kion elekti por la sekva dimanĉo? Ĉi–dimanĉe mi predikos en la propra paroĥo, do mi povos elekti ion, pri kio dum la lastaj du semajnoj mi plurfoje aŭdis paroli homojn en nia komunumo, temon, pri kiu mi povas supozi, ke se kelkaj ĝin tuŝas, supozeble ĝi tuŝos ankaŭ aliajn… Sed kion? Kion ekzakte mi prenu?

...

Daŭrigota en la sekvonta numero

# Momentoj de la vivo de Martin Luther
## sur la provizoraj monbiletoj

Erikas Laiconas

La suba teksto estas plejparte la enkonduko de malgranda publikaĵo de Erikas Laiconas kun kelkaj ekzempleroj de la monbiletoj priskribitaj (montrante kiam Martin Luther estis kaptita). Red.

Ĉiu homo ion ajn tre valoras, tion ajn ĝuas kaj ion ajn kolektas. Iuj poŝtmarkojn, iuj alumetetikedojn, bildkartojn, aŭ iujn ajn publikaĵojn, medalojn, horloĝojn, diversajn artaĵojn, librojn, aliaj monbiletojn, aliaj diversajn antikvaĵojn. Pli riĉaj homoj kolektas antikvajn pentraĵojn, ekzemple en Kaŭno estas muzeo de la kolekto de antikvaj pentraĵoj de s-ro Žilinskas. Tio estas kolektado de la parteto de iu ajn historia momento. Mia konatulo kaj esperantisto loĝas en Germanio kaj kolektas monbiletojn kaj poŝtmarkojn.

Post la unua mondmilito Germanio ege ŝparis koloran metalon: kupron, nikelon kaj al apartaj urboj permesis eldoni monbiletojn por uzi en urboj kaj apudaj vilaĝoj. Ilia valoro ne estis granda; ĝis 1 aŭ 2 markoj kaj estis







uzataj mallongan tempon; ĉirkaŭ unu monaton. Poste estis eldonataj aliaj monbiletoj. Sur la monbiletoj estis publikigataj portretoj de eminentaj homoj de ilia urbo kaj momentoj el ilia vivo. Min interesis la urboj, kie loĝis kaj agis Martin Luther.

Mia konatulo, esperantisto sinjoro Johano Jankowsky havis du ekzemplerojn de tiuj monbiletoj kaj donacis ilin al mi. La grandeco de la monbiletoj ĉirkaŭ 75 x 105 mm. Estis ankaŭ alia grandeco, kaj pro tio mi notas la grandecon de la monbiletoj. Verŝajne tio ne estas plena kolekto kaj kiu havas pliajn, povas kompletigi la kolekton kaj la katalogeton. Pro tio, ke tio estis por mi novaĵo, mi decidis eldoni katalogeton en Litovio, ĉar mi esperis, ke aliaj luteranoj, ne kolektantoj, ankaŭ ekinteresiĝos, mi decidis eldoni, en malgranda kvanto, ne kolorajn kopiojn kiel manuskripton. Tio estas kvazaŭ aldono al publikaĵoj pri d-ro Martin Luther kaj lia vivo.

# MI ESTAS KIU ESTAS — PARTO 2

## MI ESTAS LA PANO DE VIVO (Johano 6:25–40)

pastoro Bayo AFOLARANMI

### Enkonduko

Kial ĉi tiu "MI ESTAS" diraĵo? Jesuo Kristo ĵus nutris 5000 homojn per la lunĉo de iu knabeto (Joh 6:1–13). Kvazaŭ ĝi estis la signo kiun la homoj atendis. Ili volis perforte farigi Lin reĝo (v[1] 14–15). Tial, ili serĉis Lin. La reago de Jesuo Kristo okazigis ĉi tiun "MI ESTAS"–diraĵon.

### La serĉado por Kristo

(v 22–25)

Ĉu ili serĉis Jesuon Kriston por doni siajn vivojn al Li je la dua tago de nutrado de la 5000 homoj aŭ ĉu ili havis alian, kaŝitan motivon? Ili serĉis Lin ĝis ili trovis *"Lin trans la maro"* (v 25). Nuntempe, kelkaj homoj iradas al lokoj de adorservo, sed kiun kaj kion ili serĉas?

### Jesuo Kristo kaj la serĉado

(v 26–27)

La homoj serĉis Jesuon nur pro miraklo (v 26). Ĉu ili konsideris la plej gravan miraklon de savo? Estis nenia spirita motivigo. Al ili mankis spirita percepto. Kial multaj homoj adoras Dion nuntempe? Ĉu tio ne estas pro la materiaj kaj financaj benoj kiujn ili akiras de Li? Jesuo Kristo tial konsilis ke ĉi tio ne estu tiel. La kialo estas, ke materiaj nutraĵoj kaj benoj ne estas ĉio. Ili estas portempaj. Tamen, spiritaj nutraĵo kaj beno kondukas al eterna vivo. Dirante, *"Laboru ne por la pereema nutraĵo...,"* Jesuo Kristo ne instigis maldiligentecon. Li emfazis la Skribaĵon kiu diras, *"...Ne per la pano sole vivas homo"* (Rea 8:3; Mat 4:4; Luk 4:4).

### La laboro de Dio

(v 28–29)

Aŭskultinte ĉi tion, la homoj miskomprenis la postulon de Dio por ĝusta staro kun Dio per pieco, anstataŭ la aŭtentika kredo je Jesuo Kristo. Paŭlo sumigis ĉi tion en Rom 10: 2–4. *"ĉar mi atestas pri ili, ke ili havas fervoron al Dio, sed ne laŭ scio. Ĉar nesciante la justecon de Dio, kaj penante starigi sian propran justecon, ili ne subiĝis al la justeco de Dio. ĉar Kristo estas la fino de la leĝo por justeco por ĉiu, kiu kredas."*

Nuntempe homoj ofte pensas ke ili povas meriti eternan vivon; ili ofte forgesas ke savo estas donaĵo per graco, kaj ne per laboro (vidu: Efe 2: 5, 8–10). Tit 3:5 diras, *"ne per laboroj faritaj en justeco, kiujn ni mem faris, sed laŭ Sia kompato [Jesuo Kristo] savis nin, per la lavado de renasko, kaj per la renovigo de la Sankta Spirito."* Kio estas la laboro de Dio? Jesuo Kristo donis la ununuran kondiĉon de la laboro de Dio — nur kredu je Li, poste servu Lin. ĉi tio estas emfazita en Efe 2:8–10, *"Ĉar per graco vi saviĝis per fido; ne per vi mem: ĝi estas dono de Dio; ne el faroj, por ke neniu fanfaronu. Ĉar ni estas Liaj faritaĵoj, kreitaj en Kristo Jesuo por bonaj faroj, kiujn antaŭaranĝis Dio, por ke ni iradu en ili."* Dio amas vin ne pro tio kion vi faras,

sed pro tiu kiu Li estas.

### Demando por mirakla signo

(v 30–33)

La homoj estis miraklo–konsciaj. Post la mirakla nutrado de pli ol 5000 homoj, ili ne povis kredi, se Jesuo ne estus pruvinta, kiu Li estas per miraklaj signoj. Ne mirinde, Paŭlo akuzis ilin pro la postulo de miraklaj signoj en 1 Kor 1:22. Ili estas kiel la nuntempaj homoj kiuj diras, 'Vidado estas kredado'. Tamen, por Dio, estas la malo — *"...se vi kredos, vi vidos la gloron de Dio"* (Joh 11:40; vidu ankaŭ 2 Kor 5:7). Ili supozis ke Jesuo faru ion kiel tion kion Dio faris nutrinte la Izraelidojn per manao, ili forgesis ke multaj homoj vidis kaj eĉ manĝis la miraklan manaon kaj ankoraŭ ne kredis. Multaj vidus miraklojn hodiaŭ kaj ankoraŭ ne kredus je Dio. Tamen, en tri rimedoj, Jesuo Kristo korektis ilian ideon kaj klarigis la spiritajn implikojn de la manao: a) Dio, ne Moseo, donis la manaon (v 32a); b) Dio ankoraŭ donas la "manaon" nuntempe (t.e. la spiritan manaon); kaj c) la vera pano de ĉielo estas Jesuo Kristo, ne manao (v 33).

### La deklaro

(v 34–40)

Kiel la samarianino en Johano ĉapitro 4 bezonis vivantan akvon, la homoj petis por la *"vera pano"* (v 34). Ili ne rekonis Jesuon Kriston kiel la panon de ĉielo. Jesuo Kristo tial deklaris, *"Mi estas la pano de vivo; kiu venas al mi, tiu neniam malsatos, kaj kiu kredas al mi, tiu neniam soifos"* (v 35). Per ĉi tiu deklaro, Jesuo Kristo korektis du pliajn erarojn de la penso de la homoj: a) La nutraĵo, kiun Li priparolis, koncernas lian personon, ne aĵon. Pano estis la esenca nutraĵo je la tempo de Jesuo Kristo surtere. *"Pano de Vivo"* signifas pano (t.e. Jesuo Kristo) kiu provizas vivon. b) Iu ajn kiu havas ĝustan rilaton kun Jesuo Kristo havos eternan kontentigon. Jesuo Kristo emfazis ĉi tion en versikloj 37–40 kaj 10:27–29. La kredantoj havos eternan vivon kun Jesuo Kristo. Ili estas eterne sekuraj.

### La reago de la homoj

(v 41–42, 52)

En sia homa penso, la homoj ne povis kredi tian deklaron. Unue, ili konis la viron Jesuo kaj eĉ Liajn parencojn. Due, kiel ili povis manĝi Lia karnon? Ĉi tio fariĝis akra argumento inter ili. Multaj homoj ne povas kredi je Jesuo Kristo nuntempe pro sia malprava kaj nesufiĉa ideo pri Li, kaj eĉ ilia konateco kun Li. Tamen, Jesuo ankoraŭ klarigis la realecon de ĉi tiu deklaro pri Si (v 43–51, 53–58), sed la homoj ne povis kredi je Li pro sia manko de spirita percepto. Ĉi tio igis multajn homojn, Liajn disĉiplojn inkluzive, ne plu sekvi Lin (v 60, 66).

### Konkludo

Kiel estas via spirita apetito por justeco? La Pano kiu provizas eternan vivon estas Jesuo Kristo. Vi ne devas 'labori' por la Pano. Kredu je Li. La donado de ĉi tiu pano estas la nura antaŭnecesaĵo, kaj vi estos kontentigita por eterne. ĉu vi kredas ĉi tion? Ne estu tro facilrilata kun ĝi! Lasu vian rilaton kun Jesuo rezulti en profundan intimecon kun Li. □

[1] 'v' estas mallongigo de versiklo(j)

# FRUMATENE

el: "Nuestro Pan Diario" jan/feb/mar 2004 (RBC Ministries — Usono)

Vernon GROUNDS
tradukis Jerald VEIT

Ĉu vi estas tiom okupita dum la tago, ke vi apenaŭ trovas tempon por esti kun Dio? Multaj homoj dediĉas tempon al tio frue en la mateno, antaŭ ol ili fariĝas kaptitaj de la freneza ritmo de la tago.

Iam mi legis pri iu tre okupita homo, kiu tamen sukcesis trovi tempon por doni bonan spiritan impulson al la tago. Temas pri d-ro Ben Carson, ĉefo de la fako pri infana neŭrokirurgio ĉe la Infana Hospitalo Johns Hopkins en Usono. D-ro Carson akceptis tiun gravan postenon en 1984, kiam li estis nur 33–jara.

**Lasu, ke kristo estu via unua penso matene, kaj via lasta nokte!**

Jen la atesto de d-ro Carson pri la valoro doni la prioritaton al spiritaj aferoj:

"*Mi malkovris, ke sekvi iun spiritan ritmon — ĉu per meditado aŭ la legado de religiaj tekstoj — povas havi pozitivan influon al la tuta tago. Ĉiun matenon mi pasigas duonan horon legante la Biblion, kaj aparte la Sentencojn de Salomono. Ili ja enhavas tiel multan saĝecon! Dumtage, se mi renkontas frustrigan situacion, mi pensas denove pri unu el tiuj versikloj, kiujn mi ĵus legis matene*".

Jesuo ofte devis okupiĝi pri tre postulemaj homamasoj. En la Evangelio de Marko ni legas jene: *Kaj matene, antaŭ ol la nokto pasis, li leviĝis, kaj foriris en dezertan lokon, kaj tie preĝadis* (Mar 1:35).

Ĉu vi dediĉas tempon por legi la Vorton de Dio kaj por preĝi? Provu fari tion en la mateno. Tio ja povas transformi vian ordinaran tagon.

□

---

# MIA PATRO!

Teilhard DE CHARDIN
tradukis Éva FARKAS-TATÁR

En Viajn manojn
mi transdonas mian spiriton!
Kiel bone estas, ke ni povas lasi
nian manon al tiu Mano,
kiu rompis kaj ekvivigis la Panon,
kiu benis kaj karesis la infanojn,
kaj kiun najloj traboris.
Konfidi nin al tiu Mano,
kiu similas al la nia,
sed kies laŭplaĉan
decidon nura boneco gvidas
kaj kiu ĉiam pli strikte
ligas nin al si mem.
Transdoni nin al tiu mola kaj
grandpotenca Mano,
kiu atingas la kernon de la animo,
kiu formas kaj kreas,
kaj tra kiu inundas
tiel senlima amo.

# NOVAJ ALIĜINTOJ KAJ LA KONGRESA LOKO

La aro da partoprenantoj de nia kongreso kreskis per la subaj personoj:

| | |
|---|---|
| 101 s-ino BLAŽKOVÁ Marie | CZ |
| 102 s-ino BRANDEJSKA MUD Milena | CZ |
| 103 s-ino MATUŠKOVÁ Iva | CZ |
| 104 s-ino BELOŠEVIĊ Marija | KR |
| 105 s-ino DARVAS Zsuzsa | HU |
| 106 s-ino BALOG Maria | RO |
| 107 s-ino Dr BIKSZÁDI Ilona | HU |
| 108 s-ro ZECCHIN Armando | IT |
| 109 d-ro MÁRKUS Gábor | HU |
| 110 s-ino SIGMOND Júlia | RO |
| 111 s-ro TASNÁDI Andrei Zsolt | RO |
| 112 s-ino TASNÁDI Ella | RO |
| 113 s-ino van der KOOIJ Madzy | NL |


1


2


3


4


5

La bildoj montras la kongreslokon kaj precipe:

1 – La enirejo de la tereno de la studenta hejmo. Tie interne troviĝas parkejo por la aŭtoj.
2 – La flanko kun la ĉefa enirejo de la konstruaĵo.
3 – La alia flanko, kie videblas la sanktejo de la kapelo.
4 – Granda salono - la prelegejo de nia Kongreso - en la studenta hejmo en Josephinum.
5 – Parto de la sanktejo interne.

# Semi fidele per preĝado

pastoro Bayo Afolaranmi

La plej granda tasko kiun Jesuo Kristo donis al ĉiu kristano estas semi la semon de la evangelio en la vivoj de nekredantoj (Mat 28:19-20). Oni devas fari ĉi tiun taskon fidele en multaj rimedoj. Unu el la rimedoj estas PREĜADO. Oni ne tro emfazas la gravecon de preĝado por iu kristano. Por semi la semon de la evangelio fidele, ni bezonas preĝon. La plej bona rimedo por subteni mision estas preĝi por misio kaj la misiistoj. En Rom 10:1, la misia prizorgo de Paŭlo estas vidita je lia preĝo al Dio. Ni ankaŭ devas havi tian prizorgon kaj ĝi devas esti senĉesa (Efe 1:16).

Ni povas preĝi por multaj homoj kaj aferoj en kaj pri misio. Ni povas preĝi por la misiistoj en la misiaj lokoj kaj por tiuj kiuj planas iri. Ni devas preĝi ke Dio tuŝu la korojn de multaj homoj por ke ili estu pretaj fariĝi fidelaj semantoj de la semo de la evangelio. Multaj animoj volas ke oni semu la semon en ili, sed *"kiel ili aŭdos sen predikanto?"* (Rom 10:14).

– Preĝu ke multaj homoj fariĝu portempaj kaj/aŭ plentempaj misiistoj por atingi la perditajn animojn!

La registaro de aparta lando ludas gravan rolon en siaj agadoj en la lando.

– Danku Dion pro registraroj kiuj estas favoraj al misio!

– Preĝu ke la aliaj kiuj estas malamikemaj al la semado de semo de evangelio malfermu siajn pordojn por ke la semo estu semita libere en tiuj landoj! Ni devas preĝi por estraro ke ili povu konservi pacon kaj ordon por ke la evangelia semo kresku laŭ la modelo kaj volo de Dio.

Ĉar mono estas granda faktoro en semado de la evangelio,

– ni preĝu ke Dio levu homojn kiuj estos fidelaj en donado por misio (Fil 4:15).

– Preĝu ke vi mem estu fidela je ĉi tio!

– Preĝu ankaŭ ke ĉi tiuj monaĵoj estu ĝuste uzitaj al la gloro de Dio semante la semon de evangelio fidele inter la nekredantoj!

Ni devas preĝi por la nekredantoj ke ili malfermu siajn korojn al la evangelio kaj lasu la semon de la evangelio esti semita je la bona tero de iliaj koroj (Mat 13:7).



Semi la semon de evangelio estas spirita milito. Ĉi tiu milito *"estas ne kontraŭ sango kaj karno, sed kontraŭ regantoj, kontraŭ aŭtoritatoj, kontraŭ mondpotenculoj de la nuna mallumo, kontraŭ la spiritaroj de malbono en la ĉielejoj"* (Efe 6:12). La armiloj kiujn ni uzas batali ĉi tiun militon ne estas armiloj mondaj; ili estas fidelaj preĝadoj kiuj estas *"potencaj antaŭ Dio por la deĵetado de fortikaĵoj; deĵetante diskutojn, kaj ĉian altaĵon levatan kontraŭ la scio konforma al Dio…"* (2 Kor 10:4-5).

Jesuo Kristo deklaris ke krom se homoj vidas signojn kaj mirindaĵojn, ili tute ne kredos je la evangelio (Joh 4:48).

– Ni preĝu por signoj kaj mirindaĵoj por helpi al la ĝermado kaj kreskado de la semo kiu estis semita en vivojn de la nekredantoj!
– Preĝu por misiaj agentejoj kiel ili organizas, kunordigas, kaj partoprenas en la semado de la semo de la evangelio, ke ili faru ĉi tion fidele!



Multaj homoj plendas ke mankas al ili la tempo partopreni en misiaj agadoj kaj ke ili ne havas la monrimedojn subteni mision. Tamen, ĉi tiuj homoj povas fidele semi la semon de la evangelio per preĝo. Vi eble estas unu el ĉi tiuj homoj. Via fidela preĝado faros multe. Ĉu vi estas preta semi fidele per preĝado?



La akvarelojn pentris *Yu Jia De*/IKON (ikon@svenskakyrkan.se )



Mi – Bayo AFOLARANMI – kiu jam ofte skribis en Dia Regno, estas 34-jara edziĝinta pastoro ordinita de la konfesio de niĝeriaj baptistoj. Mi kaj mia edzino, Opeyemi, ni havas du infanojn, Boluwatife, 5, filo kaj IfeOluwa, 2, filino. Mi laboras ĉe la sidejo de la konfesio en Ibadan, Niĝerio. Miaj taskoj ĉe la laborejo estas verkado de tekstoj predikaj, pruvlegado kaj redaktado de eldonotaj konfesiaj legaĵoj, kaj tradukado de tiaj legaĵoj en joruban lingvon. Plaĉus al mi disvastigi la evangelion al multaj homoj per la reto. Tial mi semajne sendas predikojn en la angla kaj Esperanto al multaj homoj retletere.

Jen la Yahoo-retadresoj de tiu reta servo: http://groups.yahoo.com/group/spiritualdigest2003 kaj http://groups.yahoo.com/group/spiritanutrajxo/

# Kelkaj interretaj kaj komputilaj vortoj — 2

fonto: http://www.uni-leipzig.de/esperanto/voko/revo/

| | |
|---|---|
| retadreso | Signoĉeno uzata en komputila reto por indiki komputilon kaj komputadan objekton (ekz-e dosieron per Interreta adreso) aŭ uzanton (per retpoŝta adreso). Ekz. *dr_boarad@yahoo.se* |
| programaro | La programoj uzataj en komputilo (ofte kontraste al aparataro) |
| dosiero | Organizita kolekto da datumoj en ekstera memoro, ĝenerale referencata per ĝia nomo. Ekz *oktobro.pdf* |
| dosierujo | Organizita kolekto da dosieroj, ĝenerale referencata per ĝiaj nomo kaj pozicio en dosieruja strukturo. Ekz *C:\Program\Adobe* |
| savi | Gardi ion de difekto aŭ pereo |

| | |
|---|---|
| durdisko | Diskforma objekto, sur kiu estas registritaj iuj datumoj: Ekz *sondisko; magneta disko, disketo* |
| printilo | Eligi rezultojn de la komputilo sur paperon, per rimedoj elektromeĥanikaj, elektrostatikaj, termikaj ktp: *printu kaj sendu ĝin* (vian aliĝilon) *al ni poŝte* |
| dialogujo | Speciala fenestro, kiun la sistemo aperigas sur la ekrano kiam ĝi bezonas respondon de la uzanto: *facila maniero skribi la ĉapelitajn literojn en la dialogujoj* |
| preskoboldo | Ŝerce imagita respondeculo pri preseraroj. Ekz *la preskoboldo forrabis la titolon* |
| skanilo | Enigilo por ciferecigi optikan bildon, ekz-e por enkomputiligi ilustraĵon, foton, aŭ (kombine kun tekstorekonilo) enigi presitan aŭ manskribitan tekston sen klavi ĝin. |

# Kiu estas tiu - Philippe COUSSON?

## PREZIDANTO DE KELI

LA PROFILO

**Antaŭ 28 jaroj**, en la KELI-kongreso ĉeestis unuafoje du junaj viroj, unu venis el nordo, el Svedio, alia ĵus revenis el sudo, el Afriko, kie li deĵoris du jarojn kiel instruisto en lernejo. Nun, tiuj du estas redaktoro de Dia Regno kaj prezidanto de KELI. Tiuj, kiuj posedas malnovajn kolektojn de Dia Regno povas kontroli.


**La redaktoro** sin prezentis en antaŭa numero. Jen, la vico de la prezidanto. Fakte, la prezidanto estis antaŭe redaktoro, kaj sekve sin prezentis al vi kiam li ekoficis, antaŭ 15 jaroj. Kaj jam tion faris pli frue kiam li fariĝis estrarano en Södertälje, en 1981.

**Kion diri pri si mem**? Ne ĉiam facila demando. Kutime oni difinas sin per sia profesio, almenaŭ en Francio. Mi tiel estas altlerneja bibliotekisto. Sed mi tamen devas diri, ke ne pro tio mi vivas. Mi unue, ĉefe, kaj esence estas kristano, tio estas amata de Dio pro lia graco. Konsekvenco de tio estas, ke mi engaĝiĝas en la eklezia vivo. Mi estas predikisto. Mi apartenas al reformita komunumo, kaj sentas min proksima al la evangelika kompreno. En mia komunumo, mi zorgas pri la inter-protestantaj rilatoj, kaj pri la interreligiaj rilatoj.

**Nacie, mi estas franco.** Sed valoras ankaŭ la regiono, kie mi naskiĝis, kaj kie mi vivas, nome, en la franca, "Poitou" [pŭatu], kelkaj tradukas tion per Puatuo, Potevio. Mi preferas, pro lingvistikaj kialoj, Poetevio. Sekve mi parolas la francan, komprenetas la lokan lingvon, sintonĵan-poetevian. En lernejo mi lernis la anglan, kiun mi daŭre praktikas (kio ne estas la ĝenerala kazo en Francio), kaj la hispanan, kiun mi ankaŭ kompren(et)as.

**En subtegmentejo** mi trovis malnovan lernolibron, uzitan de mia onklo en sia junaĝo kaj forgesitan, pri iu lingvo. Tiun lernolibron, mi lude lernis, kaj poste fariĝis esperantisto. Tio estis antaŭ 1971. Kaj depost la jaro 1975, mi seninterrompe uzis la lingvon. Mi estas do iu speco de veterano. Mi prezidas la lokan klubon en Poitiers.

**Kunligante ambaŭ vivkialojn**, mi ankaŭ fariĝis KELI-ano. Pardonu, mi forgesis, mi estas viro, naskiĝinta en 1953, edzo kaj patro de 3 infanoj. Kelkaj eble eĉ memoras ke unu el ili, filino, Anne [An] estis bebo liturgie prezentita dum Diservo en la kongreso en Rouillé en 1986.



**Ĉu mi forgesis ion?** Eble. Por pli da detaloj, venu kaj babilu kun mi en la kongreso en Piliscsaba.

Philippe COUSSON
[filip kusõ]

# Informetoj

La 24an mia amiko kaj virunga klubestro (Virungo situas en centra Afriko. red.) informis min, ke ilia pro regionaj maltrankvilaĵoj ne efektivigita E-seminario en julio lastjare nun okazos 28.3 ĝis 2.4. Do espereble jam funkciis.

Plue li skribas: "*Mi volas ankoraŭ informi al vi ke mi planas konstrui kelkajn ĉambrojn por la instruado de Esperanto en Rutshuru-distrikto. Pro tio mi bezonas subtenojn de eksteraj geesperantistoj. Mi petas al vi informu viajn geKELI-anoj por iliaj financaj subtenoj.*"

La nomo de la 47-jara gvidanto estas Ntawu Hubert kaj li havas retadreson hubntaw@yahoo.fr.

Kore via, Åke AHLRÉN

---

S-ro Stas Loktev
M-R Pervomajskij 20 k. 70 pos
Ĥanĵonkovo, Makejevka UA 06145
Ukrainio

Li estas arda kristano, likvidis la ĉernobilo-katastrofon kaj ŝatas korespondi kun kristanaj samideanoj en la tuta mondo.

Salutas korege, Siegfried KRÜGER

## Al la jenaj landoj Dia Regno estas sendata

Albanio
Angolo
Argentino
Aŭstralio
Aŭstrio
Belgio
Belarusio
Brazilio
Britio
Bulgario
Ĉeĥio
Ĉinio
Estonio
Finnlando
Francio
Germanio
Ganao
Grekio
Gvatemalo
Hispanio
Hungario
Irlando
Italio
Ebur-Bordo
Izraelo
Japanio
Kolombio
Kongo
Koreo
Kubo
Latvio
Litovio
Nederlando
Niĝerio
Norvegio
Pollando
Rumanio
Rusio
Slovakio
Svedio
Svislando
Tanzanio
Usono
Vatikano
Zimbabvo

**Anna-Lisa Ahlrén**

Atingis nin la mesaĝo ke s-rino Anna-Lisa Ahlrén en la posttagmezo de la Sankta Vendredo, 25an de marto 2005, estis liberigita de sia severa malsano por eniri la regnon de Dia paco.

**L.A. Walther**

S-ino Walther el Portland mortis (87 jara). Ŝi estis KELI-membro ekde 1977.

# NENIAM FORGESITAJ

Elmer ESCOTO

> *"Ĉu povas virino forgesi sian infaneton kaj ne kompati la idon de sia ventro? Eĉ se ili forgesos, Mi vin ne forgesos. Jen sur Miaj manoj Mi vin gravuris; viaj muroj estas ĉiam antaŭ Mi"*
> (Jesaja 49:15–16).

Homo iufoje diris "Mi skribas ĉion, kion mi volas rememori. Tiel, anstataŭ elspezi multon da tempo provante rememori kion mi skribis, mi simple serĉas la paperon, sur kiu mi tion skribis". Multaj el ni estas kapablaj forgesi pli facile ol rememori.

Sed Dio asertas ke Li neniam forgesos nin. Eĉ ne dum sekundo ni estas ekster Liaj pensoj. Fakte, Jesaja diras al ni, ke ni estas gravuritaj sur Liaj manoj, la partoj de la korpo kiujn oni uzas por montri amon, tuŝante. Per Lia kompatema kaj tenera amo, sur Liaj manoj nin gravuris Dio.

Foje en la mezo de problemoj ŝajnas kvazaŭ Dio preteratentis nin. Ni preĝas sed Dio verŝajne ne aŭskultas. Ni legas niajn Bibliojn, sed la versikloj aperas kvazaŭ sensignifaj. Ni serĉas solvojn, sed Dio verŝajne ne respondas.

Malgraŭ viaj kondiĉoj, memoru kie via nomo estis gravurita. Estu certa, ke Dio ne forgesis vin.

Forgesemo, kio estas tre ofta problemo en la homoj, ne estas io pri kio Li suferas. La truohavaj manoj de Jesuo estas memorigiloj pri nia valoro kaj pri Lia senfina amo. Donu al Dio tempon por plenumi Lian volon en via vivo. Fidu, ke via situacio estas nur provizora. Estu firma sur Lia promeso: "*Mi vin ne forgesos*". Vi estas en bonaj manoj kun Dio!

# Kiel mi scius...

Miklós RADNÓTI (1909 - 1944)
Tradukis Kálmán KALOCSAY

Kiel mi scius, kion signifas por alia
ĉi region' flamonta? Por mi la idilia
pejzaĝ' de l' infanaĝo ĉi eta lando estis.
Kiel el arbotrunko branĉet', mi el ĝi kreskis,
kaj, mi esperas, en ĝi mi kuŝos iam kviete.
Mi estas hejme. Kiam genuas apudpiede
arbet', mi scias ties nomon kaj floron, scias,
kiuj kaj kien iras survoje, emocias
min scii, kio estas, se en somervespero
dolor' ruĝanta fluas de sur la dom-mortero.
Maŝinflugisto povas nur mapo ĝin rigardi,
sen scio, kie loĝis Mikaelo Vörösmarty.
Por li la map' uzinon, kazernon krudan bildas,
por mi kampkorto, turo, cikado, bovo mildas.
Li vidas lorne agrojn, uzinojn el la foro,
mi ankaŭ laborulon, tremantan pri laboro,
birdfajfan horton, boskon, vitojn, tombejon foran,
kaj tie, inter tomboj, avinjon softe ploran.
Desupre detruinda fervojo - kaj je budo
de relgardisto, kiu ĉestaras kun saluto
kun ruĝa flag' en mano, kun infanar' ĉeflanka;
sur uzinkorto kuŝas gardhundo granda, blanka.
Kaj jen la park', la spuro de junaj amoj ŝtelaj,
en mia buŝ' kisgustoj mielaj kaj mirtelaj.
Trotuar-rande, kiam lernejen mi paŝetis,
por ne respondi devi en tiu tag', mi tretis
sur ŝtonon - jen ĉi ŝtono, sed ja ĝi ne vidiĝas
desupre, instrumentoj ĝin montri ne sufiĉas.

Ni pekas tiel same kiel aliaj gentoj
kaj scias, kie kaj kial urĝus pentoj,
sed laboruloj vivas ĉi tie kaj poetoj
senpekaj, kaj kun menso kreskanta, infanetoj,
kiuj la menslumeton kaŝas en kel' obskura,
sed se la Paco signos, per voĉo freŝe pura
respondos nian voĉon, surdan de prema dubo.
Nin kovru grandflugile, viglanta nokto nubo!

Miklós Radnóti mortis en streĉita marŝo al germana koncentrejo en novembro 1944. Ekde 1940 – kiel judo – li plej ofte militservas, en senarmila t.n. laborservo. En liaj poemoj konceptiĝas la protestado de la homa animo, la sopirado al la patrujo kaj edzino. Li verkis ĝis la lasta tago de sia vivo. Kiam post la liberiĝo oni trovis lian kadavron en amastombejo survoje al Germanio, en lia mantelpoŝo troviĝis ankoraŭ legeblaj manuskriptoj de poemoj.

Éva FARKAS-TATÁR

